Cirkulero de Midi-Pyrénées

http://esperanto-midipyrenees.org **januaro 2013**

1 place des Avions 31400 Toulouse - 05 81 34 72 37 - sudo.pireneoj@free.fr

==========

Enhavo : p.

Examen mondial d'espéranto.....1
Stage de chant choral en Ariège.....1
Sukcesa lasta prelego de Hori Jasuo.....2
Campagne l'espéranto au bac.....2
Actions en Midi-Pyrénées 2012.....3
Raporto Jarkunveno 2012.....4
En Verniolle oni inaŭguris novan ZEO-n...6

Examen mondial d'espéranto : c'est reparti pour 2013

Pour la deuxième fois, une session d'examen mondial est prévu au mois de juin 2013. À Toulouse, il sera possible également de passer la partie orale.

En juin 2012 le Centre Culturel Espéranto, comme près d'une trentaine d'organisations dans le monde, participait à la première session d'examen organisée simultanément dans plusieurs pays. Le succès de cet évènement inédit dépassa les prévisions les plus optimistes : 356 candidats se présentèrent aux épreuves. D'un seul coup, le nombre d'attestations délivrées depuis 2008 (date à laquelle le nouvel examen KER fut établi conformément aux recommandations du Conseil de l'Europe) fit un bond de plus de 60% !

Face à un tel succès, nombreux sont ceux qui attendaient une nouvelle session d'examen mondial pour 2013. À la fin du mois de novembre, la nouvelle est tombée : ce sera **le samedi 8 juin**. Bien entendu, le Centre Culturel Espéranto a été parmi les premiers à répondre à l'appel et nous vous promettons une session à Toulouse ! Nouveauté par rapport à l'an dernier : *une session d'examen oral devrait pouvoir être organisée*. Des informations plus détaillées viendront avant la fin du mois de janvier.

Les raisons de passer l'examen KER d'espéranto ne manquent pas. Se préparer à un tel examen est un moyen de stimuler sa motivation et son apprentissage en se donnant un objectif concret. Ça permet aussi de mieux connaitre ses compétences dans la langue, car chaque niveau est défini en fonction de besoins concrets de communication. Pour ceux qui souhaitent enseigner la langue, même à titre bénévole, c'est enfin un gage de sérieux.

Mais au-delà de toutes ces motivations individuelles, qui ne concernent pas forcément chacun de nous, il faut rappeler l'importance de ces examens pour l'espéranto. Si nous voulons donner à la langue internationale un plus grande crédibilité et de meilleures chances d'être reconnue par les instances officielles, il est indispensable qu'elle se dote d'un système de certification (c'est à dire d'examens délivrant des attestations) conforme à leurs attentes. Je laisse conclure Alain, candidat à l'examen mondial de 2012 : *« l'espéranto a besoin de prouver qu'il n'est pas une langue stupide ou de hobby, mais au contraire que c'est est une langue véritable, comme les langues nationales. Il a donc besoin d'examens, semblables à ceux des langues nationales, reconnus par les institutions officielles. J'espère avoir ainsi contribué à accroitre le prestige de l'espéranto. »*

CHRISTOPHE

20-e Stage de Chant Choral en espéranto

Du 01 mars 2013 au 09 mars 2013 à La Bastide sur l'Hers en Ariège.

Ce stage choral, 19ème organisé pour le « Choeur Espéranto-Trans-Pyrénéen » sera dirigé par la Chef de chœur bulgare Zdravka BOYTCHEVA, également pianiste et soliste dans diverses œuvres. Les chants polyphoniques choisis sont issus principalement de répertoires slaves et autres de diverses époques. Plusieurs fidèles participants seront aussi munis d'instruments de musique traditionnelle et promettent de belles soirées.

JORGOS

Sukcesa lasta prelego de la turneo 2012 de HORI Jasuo

En Tarbezo, dimanĉo 30-a de Septembro estis sunoplena tago. En la koroj kaj en la ĉielo. 90 personoj tre atente kaj kortuŝite akceptis HORI Jasuo kaj ARAI Toŝinobu, kiuj disvolvis brilan prelegon pri nuna situacio en Japanio.

HORI Jasuo, fama esperantisto loĝanta en Japanio, kaj ARAI Toŝinobu, lia persona teknik-helpanto, ĝuis – same kiel la multnombraj aŭskultantoj – la kunstrebon de Esperanto 65, loka esperantista asocio, kaj loka kontraŭatomenergia asocio Nucléaire Non Merci, por organizi tiun ĉi prelegon titolitan « Kia vivo post Fukuŝimo? ». Dum la du antaŭaj semajnoj, la du organizantaj asocioj ne malŝparis siajn modestajn fortojn por disdoni flugfoliojn ĉe bazaroj kaj surmurigi afiŝojn por reklami tiun unikan eventon en Tarbezo kaj najbaraj urboj. Plie, estis organizita komuna gazetara konferenco, kio donis eblecon akiri artikolon en dua paĝo de plej grava loka gazeto. Tia kunstrebo kaj kunlaboro sukcesis arigi 90 homojn dum suna dimanĉa posttagmezo – kio estas ja konsiderinda atingo. Pli-malpli 20 esperantistoj ĉeestis, la ceteraj homoj estis allogitaj nur de la temo, ĉar oni ne eksplicite reklamis pri esperanta lingvo, eĉ ne menciis ke la prelego disvolviĝos en tiu lingvo. Ĉiuj partoprenantoj sensis kaj la kvaliton homecan de la prelego kaj la atentokapton de ĉiuj aŭskultantoj. La prelegon interpretis francen Robert LLOANCY kaj Robin' BETO.

La prelegon enkondukis Jasuo per rapida sed ege kortuŝa rakonto pri lia senesperiĝo antaŭ la eventoj, kaj pri kiel li povis rekuraĝiĝi dank' al la multnombraj subten-mesaĝoj de esperantistoj el la tuta mondo. Li menciis plie, ke scipovo de la angla neniel utilis al li tiumomente. Poste, li prezentis tutan bildaron pri la cunamo kaj ties sekvoj (detruoj, translokiĝoj, senposediĝo je ĉiuj antaŭaj havaĵoj ktp). La dua parto de la prelego estis dediĉita al la katastrofo de la atomcentralo de Fukuŝimo, klarigante la disvolvon de la akcidento, la nunan staton de la reaktoroj, kaj ĉefe la sekvojn ĉe la tuta loĝantaro: translokiĝoj devigaj aŭ memvolaj, malfacileco adaptiĝi al alia regiono, diskriminacio kontraŭ fukuŝimanoj, disiĝo kaj senorientiĝo de familioj, neglektema sinteno de la registaro al la suferantoj kaj al la malsanoj aperantaj ĉe infanoj, postuloj de amasaj manifestacioj pri ĉesigo de atomenergio kaj neklara respondo de la registaro, inter multaj aliaj aspektoj. Estis tre alirebla prelego, klare esprimata, riĉ-enhava kaj sincero-plena.

El lok-agada vidangulo, ĉi tiu kunlabor-eksperimento estas nur ĉe ties komenciĝo, ĉar jam ambaŭ asocioj interkonsentis kunlabori por kiel eble plej disvastigi la regulajn kronikojn de Jasuo: Esperanto65 provizos franclingvan version al Nucléaire Non Merci, kiu diskonigos ilin en sia propra reto. Per tiu ĉi simpla kaj baza kunlaboro, ambaŭ asocioj disvolvos kaj riĉigos sian lokan agadon.

La dimanĉon 30-an de Septembro 2012, en Tarbezo, la partoprenantoj multon lernis, kaj restis en la impresoj de ĉiuj, kiom reala, vigla estas la socia rolo de Esperanto.

ROBIN'

Bilan de la campagne pour l'espéranto au bac

Plus que quelques jours pour rejoindre les quelques 30000 signataires de la pétition qui demande à ce que l'espéranto soit ajouté à la liste des langues admises en tant qu'option au baccalauréat. Elle est parrainée par Albert Jacquard et a été signée par de très nombreuses personnalités du monde politique, associatif ou culturel
Il y a un an, les deux associations francophones, Espéranto-France et SAT-Amikaro lançaient cette pétition, relayée par de nombreuses associations locales ou personnes sympathisantes. La campagne dure encore jusque fin octobre. Il est temps de rajouter votre nom à la liste!

Pour lire l'argumentaire, voir les signataires, télécharger du matériel d'information, des feuilles de signature papier, et bien sûr signer

JEANNETTE

Bilan : actions en Midi-Pyrénées en 2012

Montauban : Contact a été pris avec la MJC, qui a accepté de mettre ses locaux gratuitement pour un atelier de découverte de l'espéranto. Une première tentative a été fixé au 5 mai, mais cet atelier a dû être annulé en raison d'un nombre insuffisant d'inscrits. La MJC a accepté le principe d'attendre la rentrée 2012 pour reprogrammer un atelier. Le 23 septembre, nous avons tenu un stand à l'occasion de la foire Biosynergie. Une petite dizaine de contacts ont été pris, l'atelier − cette fois prévu pour le 10 novembre − a pu être annoncé aux gens de passage. Le 10 novembre, l'atelier a cette fois-ci réuni 9 participants. Certains d'entres eux ont indiqué être intéressés par des cours.
Beauvais-sur-Tescou : Robert Viader, animateur du repaire des AMG local, m'a invité à partciper à un débat sur l'espéranto. Une dizaine de participants ont été informés.
Albi : Le cours d'espéranto a été reproposé au programme de l'Université Pour Tous. Malgré 4 personnes intéressées, ce n'était pas suffisant et l'UPT l'a donc annulé.

Cahors (Photo) : Comme à Montauban, un atelier avait été programmé à la MJC au printemps (le 26 mai). Là encore, il a été annulé (seulement 2 inscrits) et repoussé à la rentrée 2012 (le 27 oct). Cette fois-ci il a pu se faire avec 6 participants, dont certains sont intéressés par des cours.
Cordes/Ciel : Un stage débutant a été organisé par la médiathèque (grâce à son directeur Paul Sanda, un espérantiste) les 9 et 10 juillet. En raison d'imprévus de dernière minute (4 participants au lieu de 6).
Gaillac : Nous étions présents pendant les deux jours de la foire Biocybèle (+ grande foire bio du sud-ouest). Bilan positif, malgré les difficultés d'organisation (le forom des langues à Toulouse avait lieu en même temps).
Revel : Suite à une initiative de Roland Alric, un contact a été établi avec l'AVF et un atelier de découverte a pu être présenté le 6 décembre (5 personnes sur 8 inscrits). Plusieurs contacts de personnes intéressées par un stage débutant ont toutefois été collectés.
Projets en cours : Un atelier est prévu à Auterive le 10 janvier. La MJC de Cahors a repris contact avec moi en vu d'y organiser un stage débutant. EKC prépare une nouvelle formule d'apprentissage combiné (à distance + regroupement) appelée "formation Lernu!".
Projets à venir : Pour cette deuxième année, la priorité sera donnée à l'information avec la mise en place d'ateliers de découverte. En effet, les déplacements hebdomadaires que nécessite un cours sur place sont trop contraignants. Ils occupent une trop grande partie de mon temps, que je pourrais investir sur d'autres projets à Toulouse ou pour Espéranto-France (projet de création d'un nouveau manuel). De plus, ouvrir un cours dans un lieu où aucune association n'existe, où il n'y a pas ou peu de contacts, et où aucune campagne d'information n'a été faite au préalable n'est pas pertinent et voué à l'échec (ex Albi ou Montauban).
Pour l'instant, je continue de proposer les ateliers de découverte à titre bénévole. À terme, lorsque cet atelier aura atteint un niveau de maturité (j'estime que ce sera bientôt le cas), j'envisage d'en faire une prestation payante à proposer à des associations et structures (l'idée est qu'il reste gratuit ou à prix libre pour les participants eux-mêmes). En attendant ce moment, il reste nécessaire de couvrir les frais de communication, les supports imprimés, et les défraiements (essentiellement le déplacement). C'est pourquoi je demande à la fédération une enveloppe de 250€ pour poursuivre mon action sur la région.
Ceci ne veut pas dire que j'abandonne l'idée de proposer de l'enseignement, mais je le ferai dans un second temps et sous une forme différente : stages débutants ponctuels ou cours express sur quelques semaines.

CHRISTOPHE

Concours radio Paroles Partagées : L'Esperanto en lice

Paroles Partagées est une coopération inter-associative qui a pour but de promouvoir une pratique publique de la parole. Cette coopération a lancé un concours radio dont le thème est : **« Quelle(s) langue(s) parlez-vous ? ».**Wilfried Croses, preneur de son amateur, a décidé de participer à ce concours et a choisi l'Esperanto comme sujet de son reportage. Il s'est rendu a Albi et a interviewé avec Martine sa compagne Vincent Descargues, le président de l'association Tarn Espéranto. Les questions portaient sur l'histoire de l'Esperanto, sa place dans notre société, qui sont les espérantistes...Wilfried a également réalisé un micro-trottoir dans les rue d'Albi en demandant aux gens s'ils connaissaient l'Esperanto. Tout l'entretien est enrichi avec une bande-son musicale de Vinilkosmo. Wilfried a ensuite envoyé son montage à Parole Partagée et nous tiendra informé du résultat du concours.

VINCENT

Sintezo pri jarkunsido de Esperanto Midi-Pyrénées (16/12/2012)

Ĉeestantoj: Jorgos Comte, Kristof Chazarein, Robin' Beto, Francoise Carrieu, Gilbert Darrieux (komitatano), Nicole Champion, Marc Roger, Sylvie Roques, Marion Quenut (kom.), Nathalie Ballaguy, Renato Ballaguy kaj Pierre Bigan. **Prezidas la kunsidon Jorgos. Raportos Robin'.**

Tagordo: 1. Agadraporto – 2. Financraporto – 3. Projektoj

1. Agadraporto

1.1 Modifoj al la prezentita raporto

1.2 Aliaj rimarkoj

Nicole Desjean en Montauban tute malaktiviĝis. En Castelsarrasin estas la gepatroj de Yves Bachimont. Jorgos proponas ideon organizi prezentojn de Esperanto dum 3-4 tagoj kun invito al instruistoj kaj prelego celanta la gepatrojn por krei eventon kaj sciaron. Alian ideon: uzi la nomaron de la kampanjo Esperanto au Bac (Jorgos jam preparis liston) kaj voĉdonojn al EdE.

1.3 Aprobo : Unuanima.

2. Financraporto

2.1 Rimarkoj

Estus interese, ke venontan jaron Kristof prezentu apartan financraporton pri sia agado kadre de la Regiona Asocio, por ke ĝi povu klare bilanci pri ĉi tiu gravega agado. Renato fabrikigis proprakoste propagandajn banderolojn kaj ekspozicion. Ĉi lasta estas rigida do pli facile uzebla ol tiu de la Fede, sed tamen malpli fortika. Li pretas pruntedoni ĝin kondiĉe ke li mem transportu ĝin.

2.2 Aprobo : Unuanima.

3. Projektoj

3.1 Rekonsidero al la kontrakto Esperanto-France - Esperanto Midi-Pyrénées

La laborgrupo starigita pasintan jaron ne vere laboris, sed tamen la demando restas aktuala. Efektive, la ĝenoj esprimataj ĉiteme (dependo de Esperanto-France, nealiĝoj pro tiu ligiteco, reprezentantoj ĉe la Komitato de Esperanto-France ne havantaj klaran mandaton, nuna funkciado de la Regiona Asocio okazas malobee al la statuto, sekve ĉu ni ne ŝanĝus la statuton por ke ĝi spegulu niajn nunajn bezonojn?) restas aktualaj. La celo de ĉi tiu laboro estas studi kiel la Regiona Asocio povos starigi kunlaborajn rilatojn kun Esperanto-France, SAT-Amikaro k.a. restante reale sendependa (tio estas ne plu havi reprezenton ĉe la Komitato de Esperanto-France kaj ne plu esti “aliĝanta asocio” al Esperanto-France, kiel nun estas), por ebligi ke la Regiona Asocio kunigu diverstendencajn esperantistojn por disvolvo de la regiona agado.

Jorgos memorigas la tiamajn kialojn de la elekto aliĝi al Esperanto-France. La celo estis kunigi la fortojn de la regionaj esperantistoj kaj pli foren plifacile akiri subvenciojn de la regionaj politikaj instancoj. Koncerne la rilatojn kun Esperanto-France, estis du kontrastaj situacioj inter ĉi regiono kaj Langvedoko-Rusiljono: en Langvedoko-Rusiljono, grandega plimulto el la esperantistoj aliĝas al Esperanto-France kaj ĉi tie male nur 2 estis membroj de Esperanto-France. Oni do komence kreis statutojn kiuj faris, ke la Regiona Asocio estis sendependa de Esperanto-France, ĉar la membroj ne volis rilati kun Esperanto-France. Poste la situacio evoluis al aliĝo al Esperanto-France por ricevi kiomon de la kotizo al Esperanto-France de la tiuasociaj membroj loĝantaj en la regiono. Precizigo de Marion: tiu kiomo entute reprezentas nun proksimume 10,00€.

Aprobiĝas restarigo de la laborgrupo, kun jenaj membroj: Jorgos, Robin', Gilbert, Marion. Estas kontaktendaj Flo, Vincent kaj Andreo por proponi al ili aliĝi al la laborgrupo.

Aprobiĝas jenaj gvidlinioj por la laboro de ĉi tiu komisiono:

- Limdatoj: Fine de Junio, publikiĝo de dokumentoj por estigi diskuton inter la membroj; Fine de Oktobro, publikiĝo de firmaj proponoj diskutotaj dum la venonta jarkunsido.
- La laborgrupo devas pristudi 3 scenarojn: Kiaj statutŝanĝoj kun ties sekvoj; Konservo de la statuto nuna kun ties sekvoj; Nekonsidero al la levita temo kun ties sekvoj.

Fine aprobiĝas la jena propono: “La Regiona Asocio ne sendas ĉijare reprezentanton al la Komitatkunsidoj de Esperanto-France.”

3.2 Volontulo de EKC

Ĉijare denove EKC akceptos volontulon. Same kiel en la antaŭaj jaroj, EKC disponigos ĝin al la lokaj kluboj, la kluboj mem pagu la sekvajn veturkostojn. Kadre de sia agado celanta disvastigi Esperanton en regionpartoj ne disponantaj lokan klubon, la Regiona Asocio aprobas ripeti buĝetigon de 50,00€ por pagi veturkostojn en tiujn lokojn de la volontulo, kiu akompanos Kristof. Plie, la Asocio rebuĝetigas la sumon je 50,00€, kiu ne estis elspezita pasintas jaron kaj sekve disponigas entute 100,00€ por tiu ĉi celo.

3.3 La interreta portalo

La celo de tiu ĉi tutregiona portalo estas duobla:

- esti la regiona montrofenestro de Esperanto en la regiono,
- esti interna komunikilo pri eventoj, pri disponebla materialo ktp.

En ĝi, la informaro aperas ĉu en agendo, ĉu en artikoloj.
Nun, ĝi estas strukturita laŭaspekte en du partoj (unu por EKC, alia por la Regiona Asocio), ĉar ĉi du asocioj pagis la kostojn (130,00€ por 3 jaroj). Plie, per laŭdepartementaj paĝoj, eblas aliri kontakteblojn al la diversaj lokaj kluboj. Se iu asocio deziras disponi pri propra paĝo en tiu ĉi portalo, ĝi povas sin turni al la Regiona Asocio por partopreni pagon de la kostoj.

Rilate al “nutrado” de la portalo, ĉiu esperanto-asocio estas tre invitata publikigi siajn informojn pere de la portalo. Por ĉi tion fari, ekzistas du ebloj:

- sendi la informon / artikolon al Marion, kiu ĝin enportaligos,
- plej energi- kaj tempo-ŝpare, peti de Marion klarigojn pri kiel mem enmeti artikolon en la retejon, kaj memstare fari la laboron.

3.4 Disvastigo de Esperanto en la regiono

Kristof proponas daŭrigi la laboron komencitan pasintan jaron kaj disvolvatan de li. Konsiderante la tempon, kiun li disponas, kaj ankaŭ la malfacilon arigi sufiĉe da interesiĝantoj por starigi kurson en lokoj, kie ne estas esperanta vivo, li proponas centrigi sian agadon ĉirkaŭ la unua ŝtupo: informado per atelieroj (inkluzivantaj kvizojn, ludojn por komprenigi la ĉefajn ecojn de la lingvo ktp) pli aktivigaj ol simplaj prelegoj, kaj utiligo de la ĉeesto de la volontulo. Kiel duan ŝtupon, li proponos al interesiĝantoj lerni per la “Miksita Kurso”.

Aprobiĝas la buĝetigo de 250,00€ por pagi la kostojn de tiu ĉi agado — ĉijare denove Kristof plenumos la laboron volontule. Jorgos proponas al Kristof disponigi la kontaktojn de la Regiona Federacio de MJC.

3.5 Subteno al Interkant (Projekto Karmen)

Ĉar la Krokodila Renkontiĝo ne okazos ĉijare, ĉar multaj regionanoj partoprenas ĝin kaj ĉar estas projektata koncertoj en Lavelanet kaj Val d'Azun, aprobiĝis subteno je 100,00€. Plie, aperos artikolo pri la projekto en la retejo kaj la Regiona Asocio instigas siajn membrojn partopreni en ĝi.

3.6 Regiona reto de Pasport-Servanoj (ideoj de Gilbert Darrieux)

En regiono, kies unuavida allogo ne estas granda kaj esperantistaro tre dise lokata, estus interese starigi reton de PS-anoj kun unu kunordiganto. Tiel ĉi povus organiziĝi gastigado en diversaj domoj tra la regiono de la gastoj. La gasto turniĝus al la kunordiganto, kiu organizus ian gastigan turneon, simpligante kaj riĉigante la vojaĝon de la gasto. Plia disvolvo povus esti, ke PS-anoj de tiu ĉi reto inter si kolektus monon kaj proponus al interesa vojaĝanto senpage traveturi la regionon interŝanĝe de kontribuo al la loka esperantista vivo.

3.6 Subteno al la Korusa staĝo (Projekto Karmen)

Laŭ peto de Jorgos, aprobiĝis subteno je 50€ al la venonta staĝo en Arieĵo.

3.7 Elekto de la nova Komitato

Elektiĝis Jorgos Comte, Gilbert Darrieux, Marc Roger, Marion Quenut, Andreo Andrieu, Bernard Legeay kaj Vincent Descargues.

ROBIN'

Piede de Pireneoj en vilaĝo Verniolle, oni inaŭguris novan ZEO-n

Jen raporto kaj resumo de la 16a kaj 17a de septembro, kiam oni inaŭguris novan ZEO-n (t.e.Zamenhof-Esperanto-Objekto) en Verniolle, vilaĝo de Arieĵo. Du tagoj da festo kaj renkontiĝoj kun koncerto de Kaj Tiel Plu kaj interesaj prelegoj.

En matena sabato Flo & Nevik Martorell alvenis por instali son-sistemon, ankaŭ luman. Nathalie & René Ballaguy, Claude Fressonnet, Monique Garrigues, Jorgos & gefiloj ceteron preparis : ekspozicio pri Esperanto ; tabloj por budo de libro- servo, ankaŭ diska, botela, T-ĉemiza, ktp-a ; seĝoj por spektantoj de prelegoj ; tabloj por vesper-manĝo. Tuj post la manĝa tempo alvenis Claude Nourmont (vic-prezidantino de U.E.A.) por alporti novaĵojn de foraj landoj, de la monda esperantujo ; ŝi petis helpon kompletigan de Arno Lagrange pri ret-aĵoj, Viki-aĵoj k.s., de Flo pri muziko, disk-eldonado k.s., de Jorgos pri entuziasmiga kongreso okazinta en Italujo (la 79-a, en Mazara del Valo, Sicilujo).

Meze de post-tag-mezo Marie-Hélène Désert, kies lum-muzikan prelegon ni en Ŝatoruso lastapaske ĝuis (« Regionaj Identecoj, ĉu mito ? »), en la franca prezentis – helpe de ĉarma akompananta Jean Bourlier ĉe akordiono – tre ŝatatan geografi-histori-kultur-ecan bildon, ankaŭ politike pripensiga. Mirinda Marie-Hélène certe de tie ricevos denovajn mendoj por samspeca spektakla prelego. Post aperitivo agrabla kunmanĝado preparita en la vilaĝ-lerneja manĝejo kunigis ĉiujn intersiĝantojn : prelegantoj, muzikistoj, spektintoj kaj dancontoj. Sekve ses membroj de la najbara kataluna folk-grupo Kaj Tiel Plu surscenejen aliris siajn muzik-instrumentojn por plezurigi ĉiujn per bureoj, mazurkoj, polkoj, rondeoj, skotiŝoj kaj valsoj kaj oni longe dancis. ...ili eĉ fine aliris la publikon por al si ankaŭ aligi Marie-Hélène D. & Jean B. kaj plibone vidi ĉirkaŭantajn dancantojn.

En matena dimanĉo S-ro Robert Pedoussat – plugratulinda urbestro de Verniolle prezentis sian urbodomon al la novaj loĝantoj ; Alain Casiez prezentis E-budon en la forumo de lokaj asocioj ; Nathalie kaj René B. eksterigis la ekspozicion al la tuje inaŭgurata placeto : Claude kaj Jany per blankaj tukoj aranĝis belan verdan stelon sur herbo ĉirkaŭanta centran arbeton. Dume Marie-Hélène kaj Jean prepariĝis por denova – sed E-a – prelego ...mallongigita pro manko da interesiĝantoj (Rusa gastino kaj Ge-katalunoj iom fore tranoktis kaj ...longete dormis) ; ili do surplaciĝis por dancige plezurigi la homojn de la semajna bazaro, kiuj vizitis ankaŭ la E-budon. Iom antaŭ tag-mezo ĉiuj kuniĝis al la urbestro apud la ankoraŭ por kelkaj minutoj kaŝita ŝildo. Tuj post forfalo de la kaŝilo aperis la nomo « Jardin de l'espéranto » ege aplaŭdita.

Ekparoletis Robert Pedoussat, poste dangeme emociigita Herminia Puigsech-Muñoz (kavalirino de la franca Honor-Legio pro siaj kontraŭ-naziaj faroj) kaj Simone Pons-Moulis (filino de fameta loka verkisto Adelin Moulis kaj vidvino de Raymond Pons, fondinto de la departementa E-asocio C.E.E.A.), ambaŭ honor-prezidantinoj de la Rondo de Esperantaj Studoj de Arjeĝujo. Simone iom rakontis pri la E-aktivado de sia edzo kaj de posteuloj, ankaŭ pri la salono je lia nomo iame inaŭgurita ...antaŭ la detruado de tro malnova domo, kiun nun anstataŭas « nia » ĝardeno. Venis vico de Claude Nourmont, kiu gratule fest-parolis pri la lingvo, la movado, la ZEOj, ktp. donacante librojn por la loka biblioteko-mediateko rilatajn al E-o, eĉ en Eo, kiel « Tinĉjo en Tibeto ». Kaj konklude la urbestro nemalfiere agnoskis, ke li ricevis multajn poŝt-kartojn el Eŭropo, eĉ tuta mondo « …Verniolle neplu estas nekonata vilaĝeto ! ».

Sekvis aperitivo por ĉiuj kun delikate preparitaj manĝetaĵoj, dum kiu Xavier Rodon i Morera – de 25 jaroj animo de Kaj Tiel Plu, vivanta en Mataro (CAT-Hisp), kie naskiĝis Herminia P.-M. – kun Marie-Hélène D. muzike aŭskultigis la de li ĵus kreitan « Vals per l'Herminia », kion ege ŝatis ankaŭ la filoj Ñumen kaj Luzbel Muñoz ankaŭ vivantaj en Verniolle. Kaj la sama Xavier gitare akompanis trivoĉan kanton, kiun li antaŭan vintron instruis al interalie Luma, Floreal & Ĵasmin' Comte, Ĵani E. & Jorgos okaze de la 19-a korusa E-staĝo ĉe Pireneoj en La Bastide-sur-l'Hers. ... bona okazo por anonci la sekvan (ja 20-an !), kiu disvolviĝos de 2-a ĝis 9-a de marto 2013 sub gvidado de bulgarino Zdravka Bojĉeva jam gvidinta du kanto-semajnojn.

Post la lasta manĝo Brian Moon (Brito el Luksemburgo, profesia tradukisto ĉe eŭropaj instancoj kaj vic-prezidanto de Akademio de Esperanto) fake prelegis kaj debatigis pri la utilo/neceso de komuna, neŭtrala, justeca lingvo por Eŭropo kaj la mondo, el kio unu nova lernanto montriĝis ...kio gravas por malgranda asocio. La tuta organiz-teamo dankegas ĉiujn partoprenintojn kaj ...nur la neĉeestintoj bedaŭru.

JORGOS